Jaro IV. Junio-Julio 1914. 11-12

# INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

(I. P. R.)

OFICIALA MONATA ORGANO DE

— Internacia Asocio de Instruistoj. (I. A. I.) —

JARA ABONO : Sm. 1.500 — Senpaga por la membroj de I. A. I.

Membra kotizo por 1 jaro (La asocia jaro komencas la 1an de Aŭgusto)
- ordinara - membro : 1 Sm.
- membro - propagandulo : 4 Sm.
- membro - donaculo : 10 Sm.

N. - B. — I. A. I. ankaŭ akceptas dankeme ĉiujn donacojn, kiuj helpas ĝian agadon.

## Tarifo pri anoncoj.

Por unufoja enpreso :

| | | | |
|---|---|---|---|
| 1/1 paĝo . . | Sm. 16 | 1/8 paĝo . . | Sm. 3,200 |
| 1/2 paĝo . . | Sm. 10 | 1/16 paĝo . . | Sm. 2 |
| 1/4 paĝo . . | Sm. 6 | | |

Malgrandaj anoncoj nekomercaj Sm. 0,200

Rabato por 3-foja enpreso : 10 %
» » 6-foja » 20 %
» » 12-foja » 30 %

N. - B. — La membroj de I. A. I. pagas nur je duonprezo, krom la rabato, ĉiujn anoncojn.

*Avizoj de la Redakcio.* — Nepresitajn manuskriptojn ni resendas nur tiam, se oni aldonis poŝtpagon por resendo. — La redakcio konservas por si la rajton korekti laŭ bezono la manuskriptojn. — Represoj kaj tradukoj de niaj artikoloj estas permesataj, se ili ne estas speciale rezervitaj ; sed oni ĉiam citu nian revuon kaj sendu al ni almenaŭ 2 ekzemplerojn de la tradukaĵo. — En la fako « Bibliografio » estos registrataj nur tiuj gazetoj aŭ libroj, en kiu ajn lingvo, de kiuj venis almenaŭ 2 ekzemplerojn. — La redakcio respondas letere aŭ poŝtkarte nur tiam, se oni aldonis por la respondo internacian respondkuponon aŭ respondkarton.

REDAKTORO - ADMINISTRANTO :
Sro JAN JACOBS, kasisto de I. A. I.
BOOMSCHE STEENWEG 444, ANTWERPEN — BELGUJO.

## Estraro de I. A. I.

Honora prezidanto : Sro Dro E. Boirac, rektoro de la universitato, Dijon, (Francujo).

Prezidanto : Sro Th. Cart, profesoro de la universitato, Paris, (Francujo).

Vic-prezidanto : Sro Maréchal, profesoro, Leeds, (Anglujo).

Vic-prezidantino : Sino H. Zapater de Chalmot, profesorino. Köln a/R (Germanujo).

Sekretario : Sro F. Durieux, direktoro de lernejo, 71, rue de Bouvines, Lille (Francujo).

Kasisto : Sro J. Jacobs, komunuma instruisto, 444, Boomsche Steenweg, Antverpeno (Belgujo).

Konsilantoj ; Sro P. Christaller, profesoro, Stuttgart (Germanujo)
Sro Building, instruisto (Anglujo).
Sro E. Backheuser, profesoro, Rio de Janeiro (Brazilujo).
Sro Schönherr, instruisto, Dresden (Germanujo).
Sro Dro Clark, profesoro, Arborfield (Anglujo).
Sro O. Simon, profesoro, Wien (Aŭstrio).

---

## Konstantaj korespondantoj

ANGLUJO : Fino E. O'Brien. — AŬSTRIO : Sro A. Neŭzil. — BOHEMUJO : Sro J. Süsser. — BULGARUJO : Sro G. Poppoff. — DANUJO : Fino A. Mikkelsen. — FINNLANDO ; Sro E. Elenius. — FRANCUJO : Sro J. Aizière. — GALICIO : Sro J. Kaszycki. — GERMANUJO : Sroj M, Sykora & K. Härtel. — HINDUJO : Sro J. N. Unwalla. — IRLANDO ; Fino Stark. — ITALUJO : Sro A. Stromboli — NEDERLANDO : Sro Lutkie. — POLUJO : Sro A. Lipski. — PORTUGALUJO ; Sro J. Pires Marques. — RUMANUJO : Sro M. Timuŝ — RUSUJO : Sro S. Kuznecov. — SIBERIO : Sro I. Seriŝev.

---

I. P. R. estas tute ne profitcelanta entrepreno. Ĝi nur estas la oficiala organo de I. A. I. Ĉar tiu ĉi asocio staras ekster ĉia politika aŭ religia agado, I. P. R. ankaŭ ĉiam portos tian saman rakteron kaj neniam publikigos artikolon kiu povus iel ajn ofendi la politikan aŭ religian opinion de siaj gelegantoj. Oni ankaŭ ĉiam memoru ke ju pli multnombraj la anoj de I. A. I. estos, ju pli granda iĝos I. P. R.

---

Vendotaj tute je la profito de la kaso de I. A. I. : « *La Tutmonda Lernolibro por paroligi Esperanton* », originale verkita de F. L. G. Maréchal, B. A. — Prezo : **0.500** Sm. (afrankite) (Donaco de la aŭtoro)

« *Noto pri la Inicilo Matematika* » (16 desegn) ajoj en la teksto kaj unu folio eksterteksta kun 16 desegnajoj, verkita de Jacques Camescasse. — Prezo : **0.400** Sm. (afrankite) (Donaco de la aŭtoro).

***Akvo-trinkpokaletoj*** por la migrulo. — Prezo 3 ope por **0.100** Sm. (1 respondkupono) (afrankite) (Donaco de S-ro E. Ulitzsch).

Oni mendu tuj ĉe la administranto de I. P. R.

---

Presejo Esperantista : « DE VLIJT » Nationalestr. 54, Antwerpen.

# PARIS 1914!

Vi devas legi en la arte ilustrita

**KONGRESA GAZETO**

la cirkulerojn de la Organiza Komitato;
la informojn de la Komisionoj;
la praktikajn konsilojn de M. Z. A.;
la artikolojn de famaj Esperantistoj;
la nomaron de la Kongresanoj;
la respondon al ĉiuj viaj demandoj.

SED....

por legi tion, necese estas ricevi la Gazeton.
Ricevos ĝin *nur* la jam
aliĝintaj Kongresanoj.

VI ALIĜU!

SE VI ALIĜOS EKZEMPLE EN MARTO, LA UNUA DE VI RICEVOTA NUMERO ESTOS LA APRILA : : : : : : : : : : : : : : :

*La unua numero aperos en Januaro 1914.*

---

# LUEBLA

# " LA ONDO DE ESPERANTO "

**MONATA ILUSTRATA REVUO**

(fondita en la jaro 1909).

## Ĉiu abonanto de la j. 1914,

krom 12 n-roj de l'gazeto, — ricevos **donace** belan Esper. libron :

## Esperanta Poŝkalendaro por la jaro 1915.

« La Ondo » aperas akurate la 1-an daton, novstile. Ĉiu n-ro havas 16—24 pag. Formato 17×26. Bela kovrilo.

Literaturaj konkursoj kun premioj. Portretoj de konataj Esperantistoj. Diversaj ilustraĵoj. Beletristiko originala kaj tradukita. Plena kroniko. Bibliografio. Nia lanterno (kontraŭ **Ido**). Amuza fako (kun premioj). Anekdotaro. Korespondo tutmonda. (Poŝtk. ilustr.).

**Anonco en Koresp. Fako — 3 respondkuponoj.**

La abonpagon (**2 rubl.=2, 120 sm.**) oni sendu al librejo « *Esperanto* » (**Moskvo, Lubjanskij projezd, 3, Ruslando**) aŭ al aliaj Esper. librejoj—poŝtmandate, respondkupone, papermone, per bankĉekoj aŭ per transpag. de Esp. ĉekbanko.

---

**INTERNACIA MONATA GAZETO**

# ORIENTA AZIO

de lasta novembra numero aperas regule kun plibeligita formato, ilustrita de lignogravuraĵoj koloriĝitaj, kaj la abonprezo estas :

| | |
|---|---|
| Jarabono : | Sm. 1.400 |
| Unu aparta numero : | Sm. 0.120 |

Provnumero : 1 respondkupono.

(Oni ne akceptas poŝtmarkojn, krom japanaj)

Adreso : « *Sekaigo-Ŝoin* » *Oosakimaĉi, Ebaragun, Tokio — JAPANUJO.*

La kursojn por memlernantoj ni sendas, kiel antaŭe, unu el la du (Japana kaj Ĥina) nur al jarabonantoj laŭ ties elekto.

# Deka Universala Kongreso de Esperanto

## Paris — Aŭgusto 1914 — Paris.

---

### *Al la Instruistoj Gekongresanoj !*

Dum la Deka Kongreso okazos pedagogia kongreseto. Ĉiuj geinstruistoj estas kore invitataj ĝin partopreni.

La ĉefaj kunvenoj okazos *Merkredon la 5-an de Aŭgusto*, en la palaco de la « Ligue de l'Enseignement » (Ligo por Instruado), 3, rue Bécamier, apud la stacio « Sèvres-Croix-Rouge » de la fervojo Nord-Sud. La « Ligue de l'Enseignement » estas gravega franca asocio por la propagando de laika edukado ; ĝi afable konsentis akcepti nin en sia belega domo.

---

TAGORDO :

*Matene*, je la 9-a : Malfermo de la Kongreseto.

I. Ĝenerala raporto pri I. A. I. de la Ĝenerala Sekretario, S-ro Jacobs.

II. Raportoj pri agado de naciaj esperantaj instruistaj asocioj : Aŭstria, Dana, Germana, Franca.

III. Diskutado pri projekto de nova regularo de I. A. I. Tiun projekton publikigis la Maja bulteno de Internacia Pedagogia Revuo. Sin turni al S-ro Jacobs, 444, Boomsche Steenweg, Antverpeno (Belgujo), kun respondkupono.

*Tagmeze* : Komuna Tagmanĝo, 1 Sm. maksimume.

*Posttagmeze* :

I. Kun-edukado.

*a*) Mallonga ĝenerala studado de la temo ;

*b*) Nuna stato de la afero en diversaj landoj.

II. Situacio materiala kaj morala de la geinstruistoj en diversaj landoj.

*a*) Edukado de la estontaj geinstruistoj ;

*b*) Oficigado, salajroj, diversaj gradoj, laboro, direktoroj, rilatoj inter instruistoj kaj direktoroj, pensio ;

*c*) Morala situacio, politikaj rajtoj, instruistaj asocioj.

III. Vizito de diversspecaj parizaj lernejoj:unuagradaj, mezgradaj, profesiaj, duagradaj. « Sorbonne » kaj Pedagogia Muzeo.

Kompreneble la vizitoj povos okazi ne nur merkredon, sed ankaŭ la sekvantajn tagojn.

Dum la Kongreso, aparta ĉambro estos je nia dispono en la Kolegio Chaptal, proksime de la «Palaco Gaumont.»

Ni *insiste* petas ĉiujn niajn kolegojn, ke ili bonvolu zorge pripensi la temojn diskutotajn, kaj komisii iun *el siaj samlandanoj por prezenti raporton mallongan, sed sufiĉe precizan*. Post la kongreso, ni uzos tiujn raportojn por nacia propagando.

La *raportantoj* bonvolos sin konigi al mi, kaj ĉeesti preparan kunvenon *je la 17-a* (5-a posttagmeze), en *Kolegio Chaptal, Lundon 3-an de Aŭgusto.*

**Tre grave.** — La kolegoj, kiuj konsentas ĉeesti la komunan tagmanĝon, bonvolos sin konigi Lundon 3-an de Aŭgusto ĉe la Kolegio Chaptal, de la 17-a ĝis la 19-a. *Necesege estas scii iom antaŭe la nombron de la manĝantoj.*

*Por la Loka Komitato :*

J. AIZIÉRE

Alfortville, apud Paris.

---

# Donu al ili mirrakontojn !

Estas homoj kiuj, kunkreskitaj en la malvarm-materialiste kalkulita vivo ĉiutaga, absorbitaj de la plat-proza batalo por la ekzistado, konsideras ĉiun klopodon eksteren kaj super tiu mondo kiel ion, kion nia tempo ne plu toleras. Nenia revado, nenia fantaziado, nenia poezio plu, sonas la ordono ; verecon, klarecon nia epoko volas, ĝi malŝatas la belan fabelon envolvitan en nebuloj.

Kaj ĉu mirrakonto estas io alia ol tia fabelo ?

Ĉu eble ne estas ankoraŭ pli grave ? rezonas tiuj verecamantaj homoj. Ĉar feinoj, elfoj, grandeguloj kaj koboldoj, bestoj kaj kreskaĵoj kaj marĉetoj kiuj povas

babili, virineto Mizero, Peĉjo Krakeno, rulantaj buloj kaj sorĉflutetoj kaj sep-mejlaj botoj, ja ne ekzistas, ekster nia imago. Kaj ĉu tiaj malspritaj rakontoj, — aŭ mirrakontoj, se vi trovas tion pli ĝusta kaj pli bela, — ne estas tiaspecaj, por subteni aŭ naskigi superstiĉon kaj antaŭjuĝon kun ilia aro da spirit- kaj koragitantaj postdoloroj inter nia popolo ? Kaj ĉu tio ne estas grava ?

Nu venu, nia ĉiutaga vivo de batalado faras ke homo kelkafoje forrapidegas surĉevale sur principoj kaj tielnomata realemo.

Sed kiu el ni iam ekkaptis la ideon, nomi tiujn mirrakontojn alie ol fatazio laŭ la vivo, ol fabelo, ol ebleco kaj neebleco kune, envolvita en vestaĵoj de Beleco.

Kiu prezentas tiujn mirrakontojn al la popolo, la infanpopolo por komenci, tiu diras ĉion tion, tiu ankaŭ lasas tion brili tiel klare kiel la tago, tra la tuta ĉarma rakonto. Tiel ke estas neniu infano ĉirkaŭ ni, aŭ ĝi decide rifuzas kredi je la efektiva aŭ povebla ekzistado de la herooj de niaj mirrakontoj.

Jes tamen, kredi tion ĝi *faras* ; sed post nia parolado aŭ nia rakontanta legado, *kredas* nur je la bela ĉarmo, la vera Beleco, kiun la mirrakonto portas en si. Kaj tiu estas en la formo, en la lingvo de tiu mirrakonto, same kiel, — kaj kelkafoje ankoraŭ multe pli —, en la rakontitaĵo. Estas efektive da tiaj aĵoj, kiujn tutsimpla homo povas resumi per ses linioj, kvazaŭ ĝi estas plena ; sed tiam la kerno estas el ĝi, t. e. *kun* la bela lingvo, la plibeligo, la simboligo de la fundamenta ideo, la koloro kiuj lumas kaj brilas super la tutaĵo, — alivorte : la mirrakonto ne plu estas.

Ho, mirrakontoj, « malspritaj, » sed bele ĉarmantaj aferoj, ne lasu vin analizi, ne dispecigi ; ne toleru ke laiko vin reduktas al « iaj ses linioj » kaj suferu same ne, ke oni plenigu vin per ŝtopvortoj kaj plilongigu ĝis « akvo kaj lakto » ; restu kiu vi estas, tuta peceto da Beleco, kaj se *oni* vin riproĉas, ke vi flugas eksteren kaj super tiu ĉi vivo, tiu « oni » estu tiam nur prava,... ni estas feliĉaj, stari kun

vi momenteton en pli bela mondo kaj perdiĝi en viajn sonĝojn !

Legantoj, okazas kelkafoje ĉe homo, precipe ĉe tiu kiu volas teni sin ekster nia malvarme-prikalkulanta vivo, ke li foje iĝas lirika. Kaj tio okazas ĉe li tiel facile, kiam li eniras en la mondon de la mirrakontoj ; unu paŝeto en ĝi, kaj la ravo brilas tiel bele orumanta ĉirkaŭ vi, ke vi volus resti en ĝi kaj kunkreski.

Mi ne plu ĝuste scias kiel mi envenis en ĝin. Mi estis infano, studento, aspiranto-instruisto, kiel vi ĉiuj. Sed mi ne povas plu memori ke mi de el la lernejo iam eksciĝis unu belan mirrakonton ; kaj tutcerte mi plej bone scias, ke la edukisto celita » (por ree foje paroli lirike) mi ne unu solan fojon aŭdis nomi unu Grimm aŭ unu Andersen.

Se okazis ĉe vi kiel ĉe mi, tiam tiu kono pri mirrakontoj, tiu amo al mirrakontoj estis kulturita kaj prizorgegita hejme, en la angulo de la kameno, en varm-agrabla, duonluma vespero Tiam estis patrino kiu rakontis al vi, dum vi alvokis ĉe ŝi, sur ŝiaj genuoj, aŭ ĉe patro, tiujn strang-lumantajn mondojn, dum vi triope, kvarope estis aŭskultantaj, rigardantaj. Kaj mi opinias, ke el la angulo de la kameno plej certe elkreskas la Beleco.

Mi certe ankoraŭ scias nomojn de mirrakontoj, kiujn mi tiam aŭdis, kaj mi vidas ankoraŭ ilian mondon kiel mi vidis ĝin en tiu tempo. Mirrakontoj unue, tiujn devas koni ĉiuj, ĉar ili eliĝas el la popolo de tie ĉi kaj de ĉie, mirrakontoj, *unu* laŭ rakontita enhavo, kiu apartenas al ĉiuj tempoj kaj al ĉiuj popoloj. Poste mirrakontoj, arte faritaj, kreitaj per *unu* plenmano, fruktoj de *unu* persona brilanta fantazio, kiel ne ĉiu homogeneracio naskas unu da ili.

Ĉu mi nomus iliajn nomojn kaj ankaŭ la nomojn de ilia « farinto » kie la historio iliu konas !

Mi bone volas ; sed ĝi tiam estu, amikoj- legantoj, por ke vi povu ilin diskonigi, post persona pli detala konatiĝo al ĉiuj kiujn tio rilatas.

La infanoj devas koni la verkaro de Grimm kaj Andersen kaj ilia familio. Hejme, estus plej bele; ni tamen scias, ke malmultaj infanoj havas la privilegion sidi en angulo de la kameno, kie la patro aŭ la patrino rakontas al ili. La lernejo tiam reprenu la feliĉaĵon neatenditan; ĝi agu, ĝia atmosfero gajnos multe da gajeco.

Eble ĝi jam rakontas kaj ĝi antaŭlegas, kelkafoje dum perditaj horetoj, kvankam mi mem kiel infano kaj kiel studento ne forte sentis tiun feliĉon. Ke ĝi faras tion regule kaj la rakont- kaj mirrakonthoro jam efektive akiris sian rajton je ekzisto, ne *unu* el niaj amikoj- legantoj kuraĝos diri. Kaj tamen tio devus aliiĝi.

Ke tiam tiu ĉi verketo povu sin direkti, ne nur al la kamaradoj hodiaŭaj, sed prefere al la aspirantoj-instruistoj, kiuj povas influi morgaŭ! Ŝajnas al mi, ni neniam estas sufiĉe fortaj, kiam la afero estas pri serioze komenci seriozan laboron.

Mi tiam deziras, estontaj kolegoj, ke en la instruado pri lingvo kaj literaturo estu lasita angulo, dediĉita al herorakontoj, mitoj, legendoj, kaj ankaŭ al mirrakontoj, kiuj ĉiuj kune plenumas gravan rolon tra la mondliteraturo. Ke vi aŭdu, legu la plej belajn partojn el tiu bela kampo. Kaj se tio alportis al vi ĝuon, — kaj tion ĝi faras tutcerte, — mi deziras ke vi transportu vian propran ĝojon, legante kaj rakontante, sur vian publikon.

Legi kaj rakonti.

Vera arto. Estas eĉ tiuj kiuj nomas tiun arton naturdevena eco, kiun ne ĉiu havas en si. Tre poveble. Oni prezentu tiam al tiu eco, kie ĝi estas dormetanta, okazon montriĝi kaj ekflori. Oni prezentu tiun okazon al ĉiuj. Kaj tiam vidiĝos, tute certe, ke « naskiĝita » artisto pri rakontado povas esti belegulo en nia mondeto, sed samtempe: ke aliaj, *ĉiuj* aliaj, kiuj laŭŝajne tute ne havis en si tiun econ, almenaŭ devas sukcesi eldiri alloge mirrakonton, kaj do certe ankaŭ povas fariĝi beno por la juneco,

Kaj mi ree foje povus esti lirika, ĉar mi prezentas al mi ion kion mi povis travivi kelkajn fojojn.

Estis vasta ĉambrego ; tie en ĝi kune sidis ducento da knaboj kaj knabinoj atendantaj. Tiam ĝuste, antaŭ sur estrado, kurteno foriĝis. kaj sinjoro sidiĝis ĉe lian tablon. Ne ĵonglisto ; simpla homo, kiu nur iom sidiĝis... por foje babili. Dum du horoj li rakontadis. Kaj ŝajnis kvazaŭ li povis ĵongli, ĉar neniam granda ĉambrego sidis tiel malgrand-kviete, ol kiam tiu sinjoro rakontis. Sed la afero estis ankaŭ ĝuste pri mirrakonto pri la Rejno ; ĉu ĝi estis el Andersen, ties vivo kaj ties « Malbela Anserido », ĉu la afero estis pri Krisnasko kaj kristnaskrakonto ?

Mi mem ne plu bone scias. Sed tio estis bela tago por tiuj ducent buboj, tago kiu havis ŝancon esti bone memorita.

Amikoj-legantoj, mi ne diras : kunvoku do duonan urbsekcion, rakontu, antaŭlegu. Kvankam mi plej bone povus tion toleri. pli bone ol multe da lerneja kaj postlerneja laboro, kiun ne ĉiam utiliĝas al la infanoj.

Sed tion ĉi tamen mi povas diri, por sia servo, amikoj-legantoj, kaj de tiuj aliaj, aspirantoj-instruistoj : estas agrable senti sin momente ĵonglisto en la okuloj de la juna popolo. La vasta ĉambrego estu klasĉambro, la infanarego nur aro da tridek ; tio donas al vi *feliĉon*, senti tiun grupeton kune kiel *unu* koro, kiu aŭskultas kaj ĝuas. Feliĉo, tro belega kaj tro granda, por rifuzi ĝin al vi mem.

Pripensu foje pri tio.

Mi bone volas tiam, atendante, foje rigardi en la trezoro de mirrakontoj, inter kiuj lirika homo tiel volonte restadas, kaj kune kun vi iom fari rondiradon tra nia lando de fantazioj kaj fabeloj kaj belaj sonĝoj.

H. Van Tichelen.

*El « Ons Woord » (Nia Parolo),*
(Organo de la unuiĝo de la Antverpenaj Geinstruistoj)

Tradukis J. Jacobs.

# Tragedio de rusa mezlernejo

(El Ĉita ĉiutaga gazeto, 1912 jaro)

La komisio de batalo kontraŭ memmortigoj de gelernantoj (Nur la nomo kaj ekzistado de simila komisio pli elokvente parolas ol miloj da vortoj pri la teruraĵo, inkubo en vivo de Ruslando! Rimarko de S-ro Seriŝev), estante la fako de la Societo por gardi la popolan sanon, antaŭnelonge faris enketon inter gelernantoj pri granda vico de demandoj ligitaj kun intima flanko de la vivo de gelernantoj, kiuj (demandoj) povas konatigi nin kun simila aperaĵo de ilia vivo kiel memmortigoj. Eĉ nur supraĵe konatiĝi kun la materialo de tia enketo, skribas serioza gazeto « Recj » (Parolo), antaŭ ĉio nevole atentigas la senriproĉan seriozecon, absolutan sincerecon kaj subaĉetantan (alloganta) pripensemecon de la respondoj je multnombraj demandoj de enket-folioj. Evidente estas, ke la enketo impreseme frapis la kordojn de la koroj de enketitoj, kaj la ŝprucaĵoj de tranĉfarantaj ofendoj por ĉiam restis kiel enradikiĝintaj en tiaj respondoj. La enketo montras la malfacilan, senĝojan bildon de materiala situacio de la plimulto da gelernantoj. De ĉi tio devenas la malsanoj de gelernantoj, malbona nutrado, malvigla humoro sub influo de batalo kontraŭ manko da penseco, ĉi tio, memkompreneble ne povas ne reflektiĝi malvigligante la psikologion de gelernantoj. Sed la gelernantoj, precipe tiaj de meza lernejo, estas elemento akrasenta, impresema, scipovanta paciĝi la pezecon de la vivo je kondiĉo, se nur ili estas ĉirkaŭitaj per homoj ilin komprenantaj, povantaj al ili doni la moralan subtenon en la minutoj malfacilaj de l' vivo. Kaj similan apogon la instruistoj ne vidas apud si en lernejo. En nia lernejo, skribas unu gimnaziano, malofte renkontiĝas la normalaj rilatoj inter lernantoj kaj instruistoj. Eĉ kelkaj instruantoj konfesas ke similaj (t. e. normalaj) rilatoj tute ne ekzistas. Ekzistas la instruantaj pedantoj, kiuj similas pli la maŝinoj ol la homoj, al tiaj personoj oni rilatas nee. Ekzistas homoj tro malfortvolemaj, ne scipovantaj sin estimigi,

kaj la lernantoj tuj rimarkis kaj komprenis ke ili (instruistoj malfortvolemuloj) estas tiaj samaj mizeraj homoj kiaj estos ili, kiam ili finos lerni. Kelkaj instruistoj, dank'al absoluta malklereco en pedagogia afero kaj dank'al sia plena senkapableco, difektis multege da junularo. Estas 2-3 instruistoj, al kiuj lernantoj rilatas tute bone. La lernejo similis la kancelarion, skribas la alia, kie oni agas ne kun homoj, sed kun paperoj. En ĝi oni ne deziras kompreni, ke neeble estas perfortegnutri la homojn kun diversaj individualaĵoj, kun diversaj psikoj per unuj sciemoj, en tia sama (egalaj por ĉiuj) grado. 26 % da respondintaj gelernantoj neas la taŭgecon de ekzistanta programo instruado, 32 % ne estas kontentigitaj per la sistemo mem de instruado, 26 %. krom tio montras la necesecon de pli libera instruado, ktp. Nedubebla estas ke la montritaj nenormalaĵoj en la vivo de gelernantoj influas ekskluzive la aferon de memmortigo. Enuo, indiferenco al vivo, senkonsolemaj minutoj, senkaŭza sopiro, la kompreno de senceleco de sia vivo, la perdo de amataj personoj, la kredo ke ĉirkaŭe ne ekzistas veraj homoj ktp. jen kion ni trovas en la enketo.

La enketo ankoraŭ unu foje jesigis la ekzistadon de malordo kaj konfuzo en nia lernejo. Ni ĉiuj kutimis diri kaj opinii, ke lernejo estas la fundamento de regno, ke juna sana idaro, eliranta el lernejaj muroj estas la estanta belaĵo de la lando, ĝia floraĵo. Sed la enketo per lingvo de gelernantoj diras al ni, kion prezentas al si ĉi tiun floraĵon de la lando, ĝia belaĵo. El lernejo eliras kaj povas eliri nur homoj kun rompetita, kripligita vivo, kun velkitaj rompitaj esperoj je pli bona estonteco, kun mortigitaj ĝemoj de vivantaj kreantaj fortoj. La plej akraseuta elemento ne eltenas la lernejan atmosferon, kaj ĝi finas la kontojn kun la vivo eĉ ne transpasinte la lernejan pordon (t, e. ne fininte la kurson), rifuzante sian aperon kiel viva azeno.

Tia estas unu el plej grandaj teruraj dramoj en rusa vivo, dramo de nuntempa lernejo. Kiam do tia ĉi dramo

havos finon? Kiam la lernejo ekvidos la matenruĝon? Lumon?

*Rimarko de Seriŝev*: Lasta demando altrudiĝas jam de longe. Kaj kion kaj kiel respondas la rusa registraro en persono de ministro de popola « malklerigado »? Ĝi respondas en persono de freneze furioze ministra kasto kaj liaj helpantaj kuratoroĵ per: malfermo de instruistaj kursoj en Peterburgo (post kiam tien alveturis pli ol milo da kursanoj), premado de gepatraj komitatoj en mezlernejoj elpelo de plej bonaj instruistoj kaj profesoroj, severa kontrolo de programo ktp. ktp. ! Tiel respondas nia registaro je akraj demandoj de rusa vivo!

*Esperantiĝis Seriŝev.*

---

# La ĝenerala situacio de la popollernejo kaj de la geinstruistoj en Saksujo.

(VIDU NRON 3 DE LA IIA JARO)

## I. *La organizado.*

I. En Saksujo ekzistas 3 specoj de popollernejo (simpla, meza kaj supera), kiuĵ diferencas precipe laŭ la celo, nombro de la lecionoj, ankaŭ nombro de la gelernantoj, pago ktp. Ĉiu infano devas viziti unu el tiuj ĉi lernejoj de la finita 6a ĝis 14a jaraĝo. Nur kiu volas viziti gimnazion aŭ alian pli altan lernejon, forlasas la popollernejon post 4 jaroj. Post okjara vizito la knaboj iras devige 3 jarojn en la pliperfektigan lernejon. Se iu ne ĉeestas, la gepatroj devas sendi skribe sufiĉan kialon; se ne, ili estas punataj (monpuno ĝis 5 Sm. aŭ malliberigo).

Paskon komenciĝas kaj finiĝas la lernjaro. Sed ĉar la dato de tiu ĉi festo ŝanĝas, la daŭro de nia lernjaro estas ofte tre diferenca.

La programoj por knaboj kaj knabinoj estas preskaŭ la samaj. La knabinoj lernas ankoraŭ virinajn manlaborojn kaj ofte ankaŭ kuiradon.

La maksimumo de la semajnaj lecionoj povas esti en subaj klasoj 20, en mezaj 26 kaj en superaj 36. La lecionoj estas tiel dividitaj, ke la gelernantoj regule nur unu fojon potage venas en la lernejon.

En Chemnitz la mez-nombro de la gelernantoj poklasa estas 42 (en simplaj lernejoj), 36 (en mezaj) kaj 31 (en superaj.) En malriĉaj komunumoj ĝi estas pli granda, sed laŭ lego ne pli ol 60.

Niaj libertempoj estas : Paskon 14 tagojn, Pentekoston 8 tagojn, en somero de la 15a de Julio ĝis 15a de Aŭgusto, 8 tagojn en aŭtuno kaj Kristnaskon de 23a de Decembro ĝis 8a de Januaro.

II. *Kiel oni fariĝas instruisto ?*

Ni vizitas 6 jarojn iun ŝtatan seminarion (de la 14a 20a aĝo.) Post la ekzameno ni estas helpinstruisto ; post 3 jaroj ni faras la duan ekzamenon ; nun ni estas plenrajta instruisto kaj devas serĉi alian oficon;ĉar kelkaj oficoj estas nur por helpinstruistoj,aliaj por rajtigitaj.Ni estas «duspeculoj».Ĉar la ŝtato zorgas pri nia edukado kaj klerigado,ĝi eksigas nin, sed la komunumo oficdonas nin.

Ĉiu lernejo (eĉ vilaĝa) kun pli ol 6 geinstruistoj devas havi direktoron. La komunumo elektas lin el siaj instruistoj aŭ, se la komunumo estas malgranda, post ekzameno el 3 de la kandidatoj.

La direktoro instruas. La nombro de liaj lecionoj dependas de la grandeco de lia lernejo (en Chemnitz 6-12 lecionoj.)

La leĝo postulas de ni maksimume 32 lecionojn posemajne. Ni, chemnitzanoj, laboras nur 30 horojn.

III. La *minimuma salajro* estas laŭleĝe la sekvanta :

A. Por *helpinstruistoj*

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| Dum la | 1a servjaro | 450 Sm | } | krom tio loĝejo kaj hejtigo aŭ monkompensaĵo. |
| » | » 2a » | 500 » | | |
| » | » 3a » | 500 » | | |

B. Por *instruistoj* :

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| komence | 750 Sm. | (fundamenta salajro) | | |
| post 3 jaroj | 750 » | + 100 Sm. | (aldono) | |
| » 6 » | 750 » | + 200 » | » | |
| » 9 » | 750 » | + 300 » | » | |
| » 12 » | 750 » | + 400 » | » | |
| ktp. | | | | |
| » 24 » | 750 » | + 750 » | » | |

krom tio loĝejo aŭ monkompensaĵo.

La instruistinoj atingas post 21 servjaroj sian plej altan leĝan salajron — 1400 Sm. entute. Se ili volas edziniĝi, ili devas forlasi la profesion.

C. Por *direktoroj* (inoj ne ekzistas) :

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| komence | 1800 Sm. | (fundamenta salajro) | | |
| post 3 jaroj | 1800 | + 200 Sm. | (aldono) | |
| » 6 » | 1800 | + 400 » | » | |
| » 9 » | 1800 | + 600 » | » | |
| » 12 » | 1800 | + 800 » | » | |

krom tio loĝejo aŭ monkompensaĵo.

La fundamentan salajron pagas la komunumo, la aldonojn la ŝtato. Sed por allogi kaj dungi kapablajn geinstruistojn, multaj komunumoj pagas plimulte ol la leĝo postulas. Chemnitz ekz. pagas entute :

al helpinstruisto 800 Sm.,

al instruisto 950-2200 Sm., al instruistino nur maksimume 1600 Sm.,

al directoro 2300-3200 Sm.

IV. Geinstruistoj, kiuj servis 40 jarojn aŭ kiuj estas 65 jaraj aŭ kiuj ne estas plu kapablaj por profesio, ricevas ŝtatan pension. Ĝi valoras post 10 servjaroj 30 % de la tuta enspezo (salajro kaj valoro de la loĝejo aŭ kompensaĵo). Ĝi kreskas ĝis 80 % post 39 servjaroj. Por la estonta pensio ni pagas nenion.

V. Ni (escepte inoj) voĉdonas kaj povas esti elektata kiel ĉiu alia regnano. Kolegoj sidas en la imperiestra, regna kaj urba parlamentoj. Ni povas skribi artikolojn por politikaj gazetoj (escepte ruĝaj). Komerci ni ne rajtas, eĉ ne nia edzino.

Osk. Melzer,
Chemnitz, (Saksujo).

## SEMADO

Antaŭ komenciĝa vintro
Semon jam ricevis tero.

Baldaŭ greno eklaboris,
Nokte, tage teron boris.

Jam aperas verda trunko
Kiun sekvos flava spiko.

## LA SABLVENDISTO

Unu maljuna blanka magisto
Ĉiun vesperon dolĉe ŝoviĝas,
Kie infanoj tie troviĝas.
Jen li pasas, la sablvendisto !

Sed sub la gesto de la feisto,
Kiam ĉe tablo patro ekfumas,
Ĉiu infano baldaŭ ekfermas
Siajn okulojn. « Jen sablvendisto !

Kaj li forĵetas, la endormisto,
Sur la palpebrojn de la infanoj
Polvon !... « Al la lito ! » diras patrinoj ;
Ĉar ĵus li pasis, la sablvendisto !

Originale verkitaj de
PAUL BENOIT.

---

# Dek-unua Kongreso de Esperanto

EDINBURGO, 1915.

## Esperanto kaj Edukado
## Grava Enketo

Kara Samideano,

Mi sendas al vi tekston de DEMANDARO pri Esperanto rilate al Edukado, kaj petas, ke vi zorge konsideru ĝin, kaj ke vi aŭ mem verku respondojn, aŭ aranĝu, ke kompetenta persono, prefere edukisto, verku ilin. Mi petas,

ke la respondoj estu senditaj al la Esperantista Centra Oficejo, 51, Rue de Clichy, Parizo, antaŭ la *30a de Novembro 1914a.*

Sendube vi konsentos, ke la plej grava venko de Esperanto estos ĝia ĝenerala enmeto en la programon de lernejoj. El ĉiuj partoj de la mondo venis raportoj pri instruo de Esperanto al infanoj kaj pri favoraj diroj de edukadaj eminentuloj rilate al ĝi, kaj estas dezirinde, ke ni havu zorge redaktitan raporton pri la tuta edukada afero, por ke, se petataj de edukadaj aŭtoritatuloj ni povu prezenti al ili oficialan raporton pri la sperto de edukistoj tra la mondo.

La Edinburga Esperanto-Societo entreprenis la preparadon de la Demandaro, kun la aprobo de la Centra Oficejo, kaj intencas proponi al la Deka Kongreso en Parizo la elekton de Internacia Komisio, kiu konsideros la ricevitajn respondojn, kaj faras raporton al la Dek-unua Kongreso en Edinburgo en 1915.

Tiu raporto estos tre grava dokumento por Esperanto, ĉar ĝi prezentos faktojn kaj spertojn el ĉiuj partoj de la mondo, kaj tradukita en naciajn lingvojn ĝi povos esti sendata al edukadaj aŭtoritatuloj en ĉiuj landoj, kaj al gazetoj, kaj sendube ĝi altiros al Esperanto seriozan konsideradon.

Sincere via, W. M. PAGE,

*Hon. Sekretario, Edinburga Esperanto-Societo.*

31 QUEEN STREET,

EDINBURGH, SKOTLANDO.

## Enketo pri Esperanto kaj Edukado.

### DEMANDARO.

1. Ĉu oni instruas Esperanton en via regiono :
   (*a*) en unugradaj lernejoj ?
   (*b*) en duagradaj lernejoj ?
   (*c*) en gimnazioj, kolegioj, kaj liceoj ?
   (*d*) en universitatoj ?
   (*e*) en aliaj edukadaj institutoj ?
2. Kiom da personoj proksimume tiel ricevis instruon ?

3. Kiom da personoj ricevas instruon je la fino de la printempo de 1914?

4. Ĉu la instruado ricevas oficialan subvencion? Bonvolu citi detalojn.

5. Ĉu Esperanto havas aprobon de edukadaj eminentuloj aŭ aŭtoritatuloj en via regiono? Bonvolu citi, se eble favorajn dirojn.

6. Ĉu vi havas lernolibrojn taŭgajn por uzo en la instruado de infanoj? Nomu ilin, kun prezo, eldonisto, k. t. p., kaj se eble sendu ekzemplerojn.

7. Se vi mem estas instruisto de Esperanto, bonvolu doni vian opinion pri la valoro de Esperanto kiel edukilo.

Se vi ne instruas, bonvolu havigi al vi kaj raporti al ni la opinion de profesiaj instruistoj.

Precipe oni ŝatus scii la rezulton ĉe infanoj, kiuj lernis Esperanton, rilate al (1) uzadpovo pri la patra lingvo, (2) aliaj lingvaj studoj, (3) korespondado kun alilanduloj, kaj (4) ĝenerala kapablo.

8. Oni danke ricevos aliajn utilajn informojn laŭ via sperto.

---

# Premioj por sukcesaj Propagandistoj.

Se ni ne gajnos la trafikon
Ni estos nenion gajnintaj.

Ĉi-tiu fakto, kiu estos ĉiam pli komprenebla al tiu, kiu lernis observi, iniciatis nin, forsendi vek-krion por atentigi la esperantistaron al komuna laboro; nur per la komerco ni povas havigi al nia lingvo ĝeneralan venkon, kaj tial nia tuta forto, zorgo kaj influo devas esti turnata al tiu direkto.

De la komenco nia Instituto sin dediĉis al la plimultigo de la uzata Esperanto en la rondoj de Industrio kaj Komerco; konate estas, ke ni jam de kelka tempo subtenas gravan servon por tiu celo; ni sendas poŝtpaketojn kun la plej diversaj presaĵoj el trafiko kaj turismo al ĉiu

ajn, kiu skribe promesas zorgan kaj precipe laŭcelan distribuon, kaj kiu sendas la necesajn poŝtelspezojn, demandeblaj je ĉiu poŝtofico.

Tiuj paketoj kaŭzis ĉie multan plaĉon kaj estas mendataj en granda nombro; ankaŭ la firmoj volonte uzadas tiun efikan kaj malmultekostan reklammanieron, per kiu ni plej bone povas pruvi la uzeblecon de nia lingvo; sed urĝe necesa estas, ke la distribuo prudente estos efektivigita.

Reklamo devas alporti profitojn; do laŭcela distribuo estas tiu, kiu liveras novajn rilatojn al la entreprenoj, komisiojn kaj gajnojn; nur per tio la firmoj estos instigataj uzadi ĉiam pli Esperanton kaj trovi plaĉon kaj konsenton al niaj celadoj.

Sed ni, ni havos de la kreskanta uzado la plej bonan helpon kaj atingos *niajn plej influajn kaj potencajn amikojn*.

Ĉi-tiuj vidpunktoj iniciatis nin proponi PREMIOJN por tiuj sukcesaj propagandistoj, kiuj atingas, ke industria aŭ komerca entrepreno eldonas ampleksajn presaĵojn en Esperanto, almenaŭ 8 pagoj, formato kiel eble 16 × 22, 6 cm. (mondformato de la «Ponto»), en nombro de 10,000 ekzempleroj; ĉar la mondo havas 1600 milionoj da loĝantoj, nur unu el 160,000 homoj povos tiam ricevi unu ekzempleron.

La premioj estas la konata kaj tre bele ilustrita « Albumo de Albrecht Dürer », esperantigita de S-ro Schmid Bern, valoro 2 Sm.

Volonte ni distribuos tiujn presaĵojn per niaj paketoj tra la tuta mondo, se ili afrankite estos senditaj al ni.

Ni esperas, ke tiamaniere ni atingos gravan superecon de nia kara lingvo kaj petas pri ĝenerala kunhelpo de niaj samideanoj.

Württembergisches Esperanto Institut
Esslingen/Neckar, Germanujo.

**Malnovaj membroj kiuj pagis sian kotizon : por la jaro 1913-1914.**

101, S-ro Verlaque. **Por la jaro 1914-1915** : 76, S-ro A. Giraud.

## Membro kiu aliĝis antaŭ la 25a de Julio 1914.

189, S-ro Johano Afanasjev, Plastunovskaja, 55, Ekaterinodar, Rusujo Sm. 1.—

## Membro kiu aliĝis por la jaro 1914-1915.

190, S-ro Aloys Roose, Kronenburgstraat, 109, Antwerpen, Belgujo Sm. 1.—

## Abonis I. P. R.

Sekcio des Bouches du Rhône de la Societo franca « Esperanto à l'école » Sm. 1.—

## Venditaj.

10 propagandaj specimenoj de I. P. R. al S-ro Verlaque (0.600 Sm.).

# BIBLIOGRAFIO

*Pri solidareco* inter esperantistoj de A. Nedoŝivin, traduko de B. Kotzin ; eldono de Kovna Esperantista Societo, Kovno, Ruslando. Prezo : 0.100 Sm.

Ĝi estas raporto farita en rusa lingvo, dum jara kunveno de K. E. S. (14 Aprilo 1913). La rusa teksto de la raporto estas eldonita aparte de K. E. S. Prezo : 0.250 Sm.

LA ZEMUNA
ESPERANTISTO

Sola Kroatlanda Esperanto-Gazeto

Senpaga. — Neabonebla.

Nur en Esperanto — Interesa enhavo.

Sin turni al Sro J. Schneider, Karlovĉic l. p. Ŝimanovci Kroatlando. — Aŭstrio.

LA BRAZILIO FILATELIA.

(6 Brasil Philatelico.)

Monata ilustrita revuo kartofilatelia kaj esperanta, por ĉiuj. (Redakate portugale kaj france.)

— 5a Jaro. —

Sola, en sia speco, en Brazilio

Petu tuj specimenan numeron, senpage kaj afranke, de la direktoro :

Dr. Benjamin C. Camozato
Cochoeira,
Rio Grande do Sul. Brazilio

ITALA LINGVO
PER ESPERANTO

Itala Lingvo estas tiel simila al Esperanto ke ĉiu Esperantisto povas per nur *unu leciono* ĝin legi, per *dudek lecionoj* ĝin kom preni.

Sekve revueto « *L'Esperanto* » iniciatas instruon de *Lingvo Itala* por ĉiulandaj Esperantistoj, ĝin prezentante sub esperanta alfabeto.

*Lecionoj* aperas regule la 10an kaj la 25an de ĉiu monato.

Abonu sendante 1 Sm, al Eldonisto.

A. PAOLET - S. Vito al Tagliamento
Udine - Italujo

AL LA MEMBROJ DE I.A.I.

—

Por diskonigi I. A. I. kaj I. P. R. uzu la oficialajn kartojn

Prezo (afrankite)

100 k. — 1 Sm (2 50 Fr.)
50 k. — 0.6 Sm (1.50 Fr.)
30 k. — 0.4 Sm (1 Fr.)
12 k. — 0.2 Sm (0.50 Fr.)

SIN TURNI AL
Jan Jacobs
*Red. - Adm. de I. P. K.*
Boomsche steenweg, 444
Antwerpen (Belgiё)

# KORESPONDADO

**Ruslando.** — Moskvo, Nikitskaja 10, kv. 21, S-ro V. Davidov, deziras korespondadi pri metodiko de Aritmetiko.

**Ruslando.** --- Moskvo, Universitato de Sanjavskij, Sinjoro Petro Kabanov (instruisto el Siberio), volontege korespondadas kun ĉiulandaj gekolegoj pri lernejoj kaj pedagogiaj demandoj, ĉu letere, ĉu per P. I.

— NORVEGA ESPERANTISTO —

Dumonata oficiala organo de Norvega Esperantista Ligo. 8 p., Esperante & Norvege. Jara abono : 2,00 kr. (1.100 Sm) Adm. : Bergsliengate, 11, Kristiania.

POŜTA ESPERANTISTO

Monata, oficiala organo de la Internacia Ligo de Esperantistaj Poŝtoficistoj (Ildepo) Jare : 1 Sm. Oni sin turnu al : Arnold Behrendt Maxstr.,22, Breslau. Germanujo

ŜVABA ESPERANTISTO

duonmonata gazeto redaktata germane kaj esperante, 8 paĝa en kvarobla monoformato oficiala organo de la « Virtemberga Esperanto-Ligo

Aperas ankaŭ kun iometeŝanĝata enhavo kiel

BAVARA ESPERANTISTO

oficiala organo de la « Bavara Esperanto-Ligo.

Sola gazeto por la memstudo en germanaj landoj ! Bonega varbilo ! Ĉiu propagandisto devas posedi ĝin !

Eksteraordinare malalta prezo. Nur Sm 0,900 jare (Rabato por grupoj).

Eldonejo R Abt, G. m. b. H. Schussenried Virtembergo (Germanujo).

— BRAZILA ESPERANTISTO —

—

Monata oficiala organo de Brazila Ligo Esperantista 8 p., Esperante & Portugale. Jarabono : 5 fr. (2 Sm) Adm. : Avenida Rio Branco 155-2° Rio de Janeiro. – Brazilujo.

SVISA ESPERO kaj MONDA POŜTO

—

Duonmonataj oficialaj organo de la Svisa Esperanto Societo alternante aperantaj, kun la monata aldono La Kolektanto por ĉiuspecaj kolektantoj.

LA MARTO

—

La tutaŭstria, ilustrita, monata familia gazeto por la diversnacia Aŭstrio.

Tute en Esperanto redaktata.

Abonprezo : jare 5 K. - 2,200 Sm. — ĉe « La Marto », Haida, Bohemujo.

## Avizo al la verkistoj kaj eldonistoj

—

Se vi vere deziras ke viaj verkoj kaj eldonaĵoj estu kiel eble plej multe vendataj, anoncu ilin en nia revuo. Viaj anoncoj estos legataj de niaj gemembroj, kiuj ĉiuj estas ne nur fervoraj esperantistoj, sed ankaŭ *instruantoj* de Esperanto. Al ili estas do komisiita konigi viajn verkojn kaj eldonaĵojn.

Gemembroj-verkistoj, profitu de la speciala rabato : neniu alia gazeto oferas al vi tiel profitigajn kondiĉojn !

Gekolegoj, varbu anoncantojn !

BELGA ESPERANTISTO

—

Oficiala monato organo de
Belga Ligo Esperantista.
24 p. Esperante,
Jara abono : 5 fr. (2 Sm.)
Adm. : 20, Vondelstraat.
— Antwerpen —

LA INTERNACIA
ABSTINENTA
OBSERVANTO
Oficiala organo de la T. E. A. L.
(Tutm. Esperant. Abstin. Ligo)

Monata gazeto por la disvastigo de Esperanto inter la Abstinentaro kaj de abstinenco kaj Bontemplanismo en la tutmondo. — Prezo jare 1.500 Sm. por ĉiulandanoj. — Eldonejo : Georg Brockhof Bomlitz, Hannover-Germanujo. — Mendebla poŝte aŭ direkte. Konto en Ĉekbanko Esperantista.

Helpu batali en la armeo de la lumo! Helpu nin en niaj strečadoj de enkonduko de Esperanto en niaj ordenoj de la Bontemplanoj ! — Aliĝu ĉiu al E. E. A. L. !

= GERMANA
ESPERANTISTO —

—

Duonmonata gazeto
Propaganda kaj literaturo
16 p., Esperante & germane.
Jara abono : 4.50 M. (2.250 Sm,)
Eldonejo : Ader & Borel
Dresden — A. I. Struvestr., 40

LA LANGUE
INTERNATIONALE

—

Monata revuo
12 p., Esperante & france
Jara abono : 1.40 fr. (0.500 Sm.)
Adm.
39, Grande-Rue, Louhans.

— GERMAN-AŬSTRIA
ESPERANTISTO —

—

Monata gazeto
8 p.; Esperante & germane
Jara abono : 3 K. (1,250 Sm.)
Adm. : VI, Dürergasse, 19,
— Wien —

SHERLOCK HOLMES EN
SERVO
DE LA HISPANA TRONO
(Lâ unua esperanta satiro)
*Deveno kaj Historio de Esperanto*
(Paroladoj de Dr Zamenhof)
Ĉiu : 75 hel. (0,300 Sm.)
Ĉe : Ĉasopis Ĉeskych
Esperantistu.
Praha II, Dittrichova ul. 7.
— Bohemujo —

## — DANUBO —

Monata organo de la rumanaj
kaj bulgaraj Esperantistoj
32 p., nur en Esperanto
Jara abono : 3.50 fr. (1, 400 Sm.)
Adm. : 14, str., Belvedere.
Bucuresti, Rumanujo.

---

## LINGVO INTERNACIA

—

Centra organo de la
Esperantistoj
La plej malnova el ĉiuj Esperantistaj gazetoj, fondita
en 1895, aperas post la 15a de
ĉiu monato.
Jara abono : 5 fr. (2 Sm.)

—

## JUNA ESPERANTISTO

—

Monata gazeto por junuloj,
instruistoj kaj
Esperanto - lernantoj
Jara abono 3 fr. (1.200 Sm.)
Ambaŭ gazetoj kune : 7 fr.
Adm. : 33, rue Lacépède
— Paris —

---

## POLA ESPERANTISTO

—

Monata gazeto kun
senpaga literatura aldono
Oficiala organo de la 8a
20 p., Esperante & pole.
Jara abono 2.50 rb. (2.650 Sm.)
Adm. Hoza 20, Varsovio.

## LA MOVADO

—

Franca esperantisto
Monata organo de la
francaj esperantistoj
16 p., Esperante & france
Jara abono : 3.25 fr. (1,300 Sm.)
Adm.: 61, Boulevard St-Marcel,
— Paris —

---

## LA HOLANDA PIONIRO

—

Monata oficiala organo de
Holanda Societo Esperantis
4 paĝa grandformata,
Esperante & holande
Jara abono : 1.20 fl. (1 Sm.)
Adm. Prinsestr., 48, Hago.

---

## ITALA ESPERANTISTO

—

Monata oficiala organo de
Itala Esperanto Asocio
12 p.. Esperante & itale.
Jara abono 3 l. (1,20 Sm.)
Adm. 13, Salità Pollaiuoli.
— Genova —

---